Laŭzana Esperanto-Societo
Decembro 2021 - n-ro 10

# Laŭzana informilo

*Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe :* ***eventaservo.org/o/LES***

## *Venontaj kunsidoj:*

- Lu, la 10an de januaro *gramatikaĵoj*
- Lu, la 7an de februaro *Ĝenerala Asembleo*
- Lu, la 7an de marto *Decidota*
- Lu, la 4an de aprilo *Decidota*

## Sabate, la 18an de decembro

# Zamenhofa Festo

### je la 11a en Laŭzano *( Espace Dickens )*







La Cedro de Beaulieu

Borde de la trotuaro de la avenuo *Bergières* en Laŭzano, apud *Beaulieu Palaco,* oni povas malkovri belegan arbon, je 20 metroj alta kun trunko da 740 centimetro periferie. Tiu majesta *Libancedro (Cedrus libani)*, kiel respektinda kaj protekta patriarko, etendas sian branĉaron super la strato. Ĝi aĝas pli ol 170 jarojn kaj estas enklasigita meze de la plej belaj arboj de la kantono. La profesiuloj regule kaj attente zorgas pri ĝi.

Elisabeth Renaud

**Laŭzana Esperanto-Societo**

pa. F. Randin

ch. de la Vallombreuse 14

CH - 1004 Lausanne

sekretario@eo-l.ch

+41 21 647 29 28

facebook.com/esperantolausanne
youtube.com …*esperantolausanne*
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8


**Komitato 2020-2021**

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

## La komitato informas:

**Nia programo aperas en** https://eventaservo.org/o/LES

### David prelegis pri *Nia Damo* de Laŭzano



Nia honora prezidanto lernigis al ni, ke "nia" katedralo, la plej granda en Svislando, estas laŭ la burgunda gotika stilo. David interesiĝis de longe pri tiu monumento; lia onklo laboris en ĝi, kiel vitralisto. Ĉiuj lauzananoj scias, ke la katedrala gvatisto krias la horojn inter la 22a kaj la 2a.

Dankon al nia preleganto.

Maryse Tissot

### Fonduo en Espace Dickens

Anoncu vin ĝis la 11a de decembro al 076 411 14 55.

Se vi ne deziras manĝi fonduon, vi povos alporti vian manĝaĵon



Feliĉan Novjaron

Tiu rakonto estas en libreto de 5 historioj verkitaj de 13 el niaj membroj.

# LA FANTOMOJ DE LA LAGO

*versio C, parto 2*

Dumnokte mi pensadas pri tiu mistero. Mi serĉas en mia memoro, kiam mi legis artikolon pri tiu afero konata kiel *"La Mistero de la Blanka Ĉevalo"*, iuj eĉ diras *"La Fantomoj de la Lago"*. Mi perfekte scias, kie tiu hotelo situas apud la nudista strando, tamen mi neniam aliris. Oni enrete disvastigas, ke ĝi vere famas pro ege bongustaj kuiraĵoj, sed tiu restoracio reputacias tro multekosta laŭ la diroj de kelkaj retumantoj. La specialaĵo de la loko estas fiŝoj venantaj rekte de la fiŝkaptistoj apude. Mi promesis al miaj geamikoj inviti ilin al tiu restoracio. Mi devas ne forgesi rete rezervi tablon por kvar. Finfine mi endormiĝas revante, ke, kiel Ŝerlok Holmes, mi solvos la misteron kun mia kara amiko, la Doktoro Watson ... Luko.

Post ok dormhoroj mi vekiĝas sufiĉe ripozita kaj lasas mian edzinon ankoraŭ dormi. Mi scivolemas enketi pri la mistero serĉante en mia komputilo. Mi trovas la retejon de la restoracio. Mi do vokas por rezervi tablon kaj demandas ankaŭ, ĉu eblas sidi vidalvide de la lago.

Dumtage ni vizitas la belegan regionon de la "Lavaux", Tutmonda *Hereda Posedaĵo de Unesko.* Vesperkomence ni alvenas al la fama restoracio sufiĉe frue por kviete ĝui la belan lumon de la sunsubiro kaj kompreneble aperitivi trinkante botelon de "Dézaley". Klara komencas skribi ion pri nia fantoma enketo. Mi konsultas la menuon kaj tre surprizita mi legas ĝian specialaĵon: "Fiŝo ornamita per delikata fitoplanktona saŭco". Kurioze! Ĝi tentas nin provi. Kial ne?

Flanke de nia tablo sidas paro, kiu laŭte rakontas: *«Ĉu vi rememoras la misteron de la Kasteleto de Glerolo … datita de preskaŭ dudek jaroj?»* demandas la virino al la viro, kiu respondas: *«Ha, jes, pri la morto de la gekastelana filino, kiu dronis en la lago. Oni neniam retrovis ŝian korpon. Ŝiaj gepatroj mortis ses monatojn poste pro ĉagreno.»* Ĉu tiuj du personoj aŭdis nin paroli pri la afero de la onklo de Luko? Ni kvar diskrete aŭskultas. La virino daŭrigas: *«Ŝajnas, ke oni vidis ŝian fantomon marŝi surakve, eĉ pli, ke la "Blanka Damo" hantas la kastelon. Ĉu vi kredas, ke ni bonŝance vidos ŝin aŭ ĝin ĉivespere?» «Ne nur la skotoj rajtas havi fantomojn, ĉu ne?»* diras la viro ridante. Ili stariĝas kaj eliras salutante nin amuzitaj.

Ankaŭ du viroj ĉe apuda tablo aŭskultis la paroladon de la paro. Ili alparolas niajn gekebekanojn: *«Tio, kion ili rakontis, tute veras. Ni tuj konstatis, ke vi estas turistoj. Mi mem plezuregas aŭdi vian kanadan akĉenton. Vidu, en nia regiono aperas misteraj aferoj. La "Blanka Damo" estas unu el multaj. Ni speciale bone konas tiun ĉi. Ni ambaŭ laboras kiel profesiaj plonĝistoj. Siatempe la polico petis nin mergiĝi por serĉi la korpon de la fraŭlino … sensukcese.»* Ĉimomente la kuiristo alvenas en la salonon por bonvenigi la klientojn. La du viroj daŭrigas rakonti: *«Ni pensas, ke ŝia fantomo profunde loĝas enkaverne ĵus sub la kastelo. La nova kastelano, la frato de la "Blanka Damo", freneziĝis kaj longe serĉis ŝian fratinon per lumĵetilo.»*













Dankon al …

Vigousse

*La Eta Satira Gazeto Romandia*

## Intervjuo de Zohra Sans, aktorino en filmo de LES



(Fare de Francisko)

*- Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.*

**Mi eniris la mondon la 9an de februaro 2001. Kiam mi naŭjaraĝis, la tuta familio forvojaĝis tra la mondo; dum tri jaroj miaj gepatroj do ludis la rolon de instruistoj. Revenante Svislanden mi sekvis la lernojarojn ĝis la fino de la gimnazio. Poste mi dediĉis du sabatajn jarojn al la fotografio antaŭ ol eniri la fakan lernejon de Vevey.**

*- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

**Mia patro decidís studi esperanton en 2008. Dum la familia vojaĝo - dank'al la internacia lingvo - ni renkontis multajn esperantistojn.**

*- Kiam vi decidis studi esperanton?*

**Mia patrino kaj miaj du gefratoj lernis ĝin dum tiuj tri jaroj.**

*- Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

**Mi ne vere scias, kion pensis la parencoj pri nia sperto tra Esperantio.**

*- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

**Krom ni kvin, neniu parolas la internacian lingvon.**

*- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

**Dum nia tramonda vojaĝo, ni haltis ĉe esperantistaj kluboj partoprenante kunsidojn, lokajn kaj naciajn kongresojn, sed neniam UK-on.**

**En 2011 la reĝisoro de la filmo *La sekreta Vilaĝeto* petis min aktori la rolon de Maria, la nepino de la vilaĝestro. Tiu sperto - esperanto parolanta – tre agrablis al mi kaj ankaŭ vivi la amikan etoson de montara filmado kun la esperantistoj de Laŭzano.**